




# ESPERO KATOLIKA



## KARAJ LEGANTOJ

Estas somero, do ĝeria tempo en kiu laŭkutime la plej multaj kluboj interrompas siajn kunvenojn por doni al estraro kaj membroj la okazon, reĝreŝigi siajn ĝortojn per agrabla libertempo, ĉiu laŭ siaj gusto kaj eblecoj. Via redaktorino jam ĝrue ĝeriis kaj revenis kun granda ĝervoro kaj vera laboremo el la belega, trankvila suninsuleto Ibiza en la Mediteranea Maro. Sed ho ve! Trovante hejme terurajn amasegojn da pritraktotaj korespondajoj ktp. mi kvazaŭ paraliziĝis; ĉar ankaŭ en mia profesia oficejo estas multtega laboro, mi ĉiuvespere rehejmiĝas laca post 11-hora ĝoresto, kaj ofte devas preskaŭ devigi min, eklabori por IKUE kaj E.K. sed ne ĉiam sukcesas: post la vespermanĝo mi ofte ne povas trovi la kuraĝon, denove eklabori. Tial la julia numero de *Espero Katolika* certe atingos vin malpli ĝrue ol ordinare, sed ĉar en aŭgusto nia revuo ne aperos, tio ne tro gravas. Mi esperas iom post iom reakiri la kutiman laboremon, sed devas konfesi, ke mi ofte malkuraĝiĝas pensante, ke mi preskaŭ tute sola devas ĝari ĉiujn laborojn por nia ampleksa internacia unuiĝo kaj en tiaj momentaj mi demandas min, ĉu mi estas ĝreneza por laboregi por ĉiuj aliaj, sakriĝante miajn proprajn interesojn, por kiuj mi neniam trovas tempon, eĉ riskante mian sanon? Tial mi denove urĝe petas vin, helpi min, ensendante interesajn artikolojn, raportojn pri gravaj okazintaĵoj en nia movado, pri landaj kongresoj, propagandaj aranĝoj kaj kursoj en via urbo, ktp. Ensendu koncizajn raportojn kaj nepre ankoraŭfoje tralegu la Dekalagon por Verkistoj sur p.83: kelkfoje envenas longegaj raportoj kun multaj trastrokoj kaj korektoj, tiel ke mi devas reskribi ilin por la presisto. Mi ĉiam devas tralegi la tutan Esperanto-gazetaron por serĉi erojn por la rubriko „*Esperanto Vivas*”: tiam mi ofte trovas raportojn pri okazintaĵoj en katolikaj rondoj, kiujn niaj membroj sendis al aliaj revuoj, sed ne al *Espero Katolika*! Vi povos ŝpari al mi multan laboron, sendante tiujn raportojn ankaŭ al mi; krome ili tiam ne aperos 1-2 monatojn post publikigo en aliaj revuoj.

Ankaŭ pri alia aĝero mi volas atentigi: ofte okazas, ke E.K. revenas kun rimarko de la poŝto „ne plu loĝas al tiu adreso”. Kelkfoje oni post kelka tempo sendas sian novan adreson, aliĝfoje mi tute ne plu aŭdas ion, kaj mi ne scias kien sendigi nian revuon. Se vi intencas transloĝiĝi, tiam nepre sendu antaŭe vian novan adreson al nia Centra Oficejo: tio ŝparas al mi ekstran laboron kaj nenecesajn elspezojn. Kaj ne ĝorgesu aldoni respondkuponon por la nova metala adreskliŝo, kiun ni bezonos tiam. Mi nomos kelkajn personojn, kiuj en la lasta tempo evidente transloĝiĝis kaj ne postlasis adreson, ĉar E.K. revenis kun tia rimarko:

Francujo: S-ro Neyrand, B. P. 41, LE CREUSOT, S.&L.

S-ro K. Smith, 18 rue Mathieu de la Drome, ROMANS

Germanujo: S-ro W. Stangier, Albertinum, BONN

F-ino Waltraud Engel, Nodungstr. 3/11, MÜNCHEN 19.





LKK-sekretariino :  
 F-ino Elena Cipriani,  
 Via R. Bonghi 34  
 ROMO — Italujo.

## DUA BULTENO DE LA L.K.K.



Vi jam ricevis almenaŭ unu aliĝilon kune kun la unua bulteno. Vi tamen certe bezonos pliajn ekzemplerojn. Petu ilin de la LKK-sekretariino, kiu senpage havigos ilin al vi. Kvankam, se temas pri unu aŭ du el viaj familianoj, vi povas mem skribi ĉiujn elementojn sur aparta leterpapero, laŭ la modelo, kiun ni pretigis por vi. Nur ni petas vin, kiam vi volas respondon al apartaj demandoj, bonvolu, se eble, aldoni respondkuponon!

Nia kongreso sin anoncas tre alloga. Aliĝu do amase, anoncu vin baldaŭ! Tiam vi ŝparas monon kaj la LKK estas helpata en siaj zorgoj. Precipe ni petas tiujn, kiuj intencas aŭ veni iom pli frue aŭ resti iom poste, sin tuj anonci, ĉar la kongresejo estas en tiu periodo meze de sia granda programo; do, ekster la semajno de nia ĉeesto, verŝajne ne plu troviĝos disponeblaj ĉambroj.

Vi certe deziras antaŭe ion scii pri via roma „hejmo“. El la publikigitaj fotoj jam vi vidis ĝian ĝeneralan aspekton. La „Centro por pli bona Mondo“ estas komplekse de konstruaĵoj laŭ horizontala tipo, kiu enkadriĝas en la pejzaĝo de dolĉaj deklivoj ĉirkaŭ la lazura lago de Albano. Transe leviĝas antaŭ la rigardo Kastel-Gandolfo, somerrestadejo de la Papo, karakterizita de la konata astronomia obsevatorio. Dum la tagoj de nia kongreso, la Papo verŝajne jam estos tie, kaj ni vizitos Lin por ricevi, laŭ nia espero, la kuraĝigajn kaj benantajn vortojn de l'Anstataŭanto de Kristo, kiel daŭrigon de la aliaj neforgeseblaj esprimoj de nia sankta Protektanto, Pio X, kaj de postaj Pontifikoj. Sed ni eniru. Tuj agrable okultrafas nin la ĉarma, vastega, lumriĉa halo kun spegulmarmora planko. Pio XII, kiu deziris kaj malŝpareme subtenis tiun grandiozan Centron por disradiado de mondskala, katolika movado, ŝajnas, afable salutante el sia bronza busto, reaŭdigi al ni siajn vortojn: „Katolikaj Esperantistoj, nelacigeble uzu la Internacian Lingvon por disvastigi la pacidealon de Kristo kaj de la Eklezio“.

---

*Italujo: Prof-ino Marisa Mariuz, Corso Ivrea 57, AOSTA*

*S-ro Comm. F. D. Ramolfo, Via Giovanni Gioletti 26, BARDONECCHIA*

*S-ro D-ro Angelo Gallicchio, Via Pessina 11, COMO.*

*Se vi konas unu el tiuj s-anoj, avertu lin aŭ ŝin, resp. sendu al mi la novan adreson. Antaŭdankon al ĉiuj helpemuloj!*

*Truus Durenkamp.*

Fratinoj de diversaj Kongregacioj kaj fraŭlinoj de l'„Oazo” prizorgas ĉiujn servojn, eĉ tre ampleksajn, ĉar ne malofte la Centro loĝigas pli ol 200 personojn. Diversaj salonoj kaj salonegoj povas ricevi grupojn pli malpli grandajn; en la aŭditorio troviĝas eĉ la aparataro por samtempaj tradukoj, kiun feliĉe ne bezonos nia esperantista kongreso, sed tio montras la unuaklasajn aranĝojn por internaciaj kunvenoj. Modernaj kaj perfektaj estas la servoj de la tetrinkejo kaj restoracio; komfortaj kaj bone meblitaj la dormoĉambroj.

Precipe impresa estas la apuda rondforma preĝejo, dediĉita al la Ĉieliro de Maria, kie povas celebri samtempe ĝis 50 sacerdotoj. Neforgesebla la impona Sankta Krucvojo, kiu disvolvas siajn 14 staciojn laŭ unukolora, seninterrompa murpentraĵo. La bunta lumo, kiu descendas de la fenestroj, la orgenaj melodioj, kompletigas la etoson de niaj senkomparaj kunvenoj, kie ĉiunaciaj homoj, en la plej vera senco katolike unuiĝintaj, kantas kaj preĝadas al la Ĉiela Patro en la tutmonda lingvo.

Sed vi prave volas scii ion pri la celo de ĉi tiu internacia Centro, kiu dum unu semajno fariĝos nia hejmo. Promenante tra la koridoroj, ni admiros vicojn da grandaj ilustritaj tabuloj: ili estas daŭra elmonro, moderne elpensita, de la vigleco de la Mistika Kristkorpo, kiu renovigas, kvazaŭ fermento, la homaron. Ĉi tio klarigas al ni la programon de tiu institucio.

La „Movado por pli bona Mondo” (Movimento Mondo Migliore = M.M.M.) naskiĝis precize el alvoko de Pio XII, la 10an de februaro 1952. Je la konsidero, ke granda parto de l'homaro devojiĝis de l'Evangelio, la Papo kuraĝe alvokis la bonvolulojn por kontraŭbatali la malbonon. La romanoj, kiuj plej direkte estas sub la gvido de la Papo, devos esti la unuaj; sed Li diskrete indikas samtempe, ke per ili Li alvokadas ĉiujn filojn de Dio: „Volonte Ni deziras, ke la potenco revekiĝo, al kiu Ni vin admonas, senhezite kondukata kaj obstine daŭrigata laŭ projektita plano, estu baldaŭ imitita”.

*Patro Lombardi*, enoficigita por la realigo de la planoj, fervore estras la laborojn. Hodiaŭ ekzistas jam solida organizo kun sekretarioj en ĉirkaŭ 10 nacioj, dum oni ekvidas la desegnon de pli granda reto, kiu etendiĝos sur la tuta tero.

La Movado, strikte supernatura, celas igi la mondon ĉiam pli bona: prizorgante asketan reformon de l'individuo, ĝi direktas al pli intima kunigo la membrojn de la Mistika Korpo de Kristo, kies kreskado kaj perfektigo estas ĝia supera aspiro. Asketa kolektiva reformo: tio estas la esenca karaktero de la Movado.

Sed oni ne kredu, ke la Institucio estas nur je dispono de sacerdotoj aŭ de religiuloj. Ĝi alvokas ĉiujn, la plej respondecajn personojn kaj la plej humilajn fidelulojn. Preskaŭ la tuta Episkoparo de la katolikaj nacioj kunvenis ĉi tie aŭ en la loka sidejo; same kiel ordenaj superuloj, kaj sennombraj legioj da religiuloj; sed ankaŭ novaj geedzoj, anoj de la katolika agado, senatanoj, laboristoj, studentoj, kamparanoj... La ekzercadoj ampleksas de malmultaj tagoj ĝis kelkaj monatoj.

Koncerne nian Kongreson, ni certe ricevos ideojn kaj fruktiĉajn spertojn de tiu mondskala organizo; sed eble ni ankaŭ donos ion: la ideon kaj la sperton de nia Esperanto, kiu mirinde simpligas la internaciajn rilatojn kaj fratigas la homojn apartenantajn al ĉiu ajn nacia lingvo.

---

*Iu pli vi konas Dion, des pli volonte vi servas al Li. — Adolf Kolping*

**LA NIMFEO.**  
**Al Liduška Kotašková.**

Spegul' de lago floras. Neĝa belo  
abundas dise sur la ond-eben'.  
El profundejo kvazaŭ stel' ĉe stelo  
sennombraj akvorojoj naĝas jen  
sopire al ĉielo.

Nimfea sonĝ' en kisoj sunradiaj  
superas venke ŝlimon de l'obskur'.  
Senvorta kant' de lumoj melodiaj  
leviĝas kun libelo al azur'  
en flugoj nostalgiaj.

La mondo restas forgesita fore  
kaj horizont' perdiĝas en silent',  
nur helaj floroj brilas rememore,  
en akvoj fluoreskas firmament' —  
vekiĝas rev' enkore...

Boate remas temp' en flua spaco,  
malproksimiĝas log' de borda ter'  
kaj blankajn velojn movas Dia graco,  
l'animo sentas tuŝon de mister,  
dankema pro l'donaco.

Ho koro, vi nimfeo suprencela,  
nur kis' de Dia Am' malfermas vin.  
De l'virga ĉast' trezoro plej fidela  
konsolon semas en la vivdestin'  
dum voj' al ĥor' anĝela.

Jan Filip .

*Antaŭ sunleviĝo*

Antaŭ ol jam la unuaj radioj  
de nia suno la teron atingas,  
plenaj je lumo kaj varmo, radioj  
kiuj ĝin vestas en purpura ardo,

kiam la noktan malhelon cedigas  
iom post iom matena krepusko,  
mallaŭte arboj la kapojn skuetas,  
el la arbaro pelante la sonĝojn,

spir' delikata, de Dio spirito,  
ŝvebas tra l'mondo, al riveret' diras,  
kaj al la floro mallaŭte kaj poste  
al la birdeto: vekigu! vekigu!

Kaj orienten la floroj nun klinas  
siajn kalikojn en ĝoja sopiro,  
kaj sur la branĉoj la birdoj ekzercas  
siajn kantetojn en mallaŭtaj sonoj.

Kiam nun ree sur vojo kutima  
fine sin montras majeste la suno,  
milfoje ĝin nun salutas odoroj,  
milfoje kantoj al ĝi ekjubilas.

E.F.

## „Kavaliroj de la mallumo”

Universitata profesoro trovis grandan ĝojon, kiam li havis okazon por riproĉi la pastrojn. „La pastroj estas vampiroj de la homa kulturo, kontraŭagantoj de la sciencoj kaj artoj, malhelpantoj de la progreso, kavaliroj de la konservemo kaj la mallumo” ĉi tiuj estis la favorataj ripetaĵoj de liaj prelegoj.

Sed li havis bravan, saĝan studenton, al kiu fine tedis la eksplodoj de la profesoro kaj iun tagon li iris viziti lin.

— Sinjoro Profesoro, mi deziras peti vin, forpeli kelkajn miajn dubojn sciencajn.

— Kun la plej granda ĝojo, juna amiko. Sidiĝu.

— Antaŭ ĉio mi deziras scii, kiuj konservis por ni la antikvajn klasikaĵojn? Kiel ili ne perdiĝis, kiam la barbareco en la mezepoko invadis la tutan kulturmondon?

— Estas konate; la monaĥoj kopiis la verkojn de la klasikuloj kaj tiel ili savis ilin de la pereco.

— Kiuj? ... la monaĥoj?

— Jes, jes; unuavice la benediktanoj.

— Do ĉu tamen la monaĥoj? La pastroj? Ĉu tiuj ĉi savis por ni la antikvajn kodeksojn? Ja, tio povis esti ege laciga laboro! Kiom el ili kaptis tuberkulozon pro la biblioteka polvo! Ĉu ne, tio okazis tiam, kiam la regnestroj eĉ sian nomon ne povis subskribi? Kiaj strangaj tempoj kaj pli strangaj fratoj, kiuj emis kopii literon post litero la verkojn de Livio, Cezaro, Virgilio, kaj ni ne preteriru ankaŭ verkojn de Propercio, Tibulo, Ovidio!! Ĉu vere la multaj kodeksoj de la plej grava literaturo estus laboro de la monaĥoj? Ja, la literoj estas kvazaŭ pentritaj, kaj la inicialoj estas efektivaj ĉefverkoj! Ho, tiuj pastroj!

— Sed do, ankoraŭ permesu, Sinjoro Profesoro, ĉu estas vere ke sen la pastroj ni havus eĉ ne Kolumbon, nek Vaskon de Gama? Oni diras ke Fra Mami desegnis en 1450 tiun faman geografian karton, kiu ekvekis en Kolumbo la penson je la granda ĉirkaŭmonda vojaĝo.

— Tutvere, juna sinjoro, — respondis moviĝadante la Profesoro, — kvankam ne estas forgeseble, ke tiun karton aliulo same estus povinta desegni.

— Ho, sendube, sendube. Sed kial estus tiu genia penso estiĝinta ĵus en pastra kapo?... Kaj ankoraŭ. Mi legis ke papo enkondukis en la aritmetikon la arabajn ciferojn por anstataŭi la maloportunajn romajn.

— Vi pravas, Silvestro la IIa. Nu, sed tion aliulo same estus povinta fari. Nu do la interpretiĝanta despotado de la pastroj!...

— Mi aŭdis ke pastro estus eltrovinta la unuan teleskopon kaj mikroskopon. Sed do tiu tamen ne povas esti vera? Ĉu ĉiu bono devenus de pastro?

— La fakto estas vera. La nomitan instrumenton eltrovis la franciskano Roger Bakon. Sed mi rimarkas, ke Roger Bakon estis moderna monaĥo kaj ne ia fisatanulo kaŝiĝanta en mallumo.

— Do kiam vivis Roger Bakon? Ĉu ne en 1292 li mortis? Hm, hm, ĉu do jam en la tiama epoko estis modernaj pastroj? Ankoraŭ iu! Kiu unue instruis, ke la Suno staras kaj la tero cirkuladas, ne estis Galilei, ĉu ne, Sinjoro Profesoro?

— Vere ne, sed Koperniko.

— Do denove pastro?! Oni diras, ke eĉ ne tiu kanoniko estis la unua, ĉar jam antaŭ cent jaroj instruis saman la episkopo de Regensburgo: Regio Montano.

— Eblas!

— Ankoraŭ etan paciencon mi petas, Sinjoro Profesoro! Kial estas nomita tiu epoko, en kiu la sciencoj kaj la artoj tiom grandskale floradis, Orepoko de Leono la Xa?

- Kial? Ĉar Leono la Xa estis speciala protektanto de la scienculoj, artistoj kaj verkistoj.
- Sed kiel povas esti? Ja, tiu Leono, laŭ mia scio, estis papo.
- Sinjoro! Mi rimarkas, ke vi venis nur por...
- Por ke ĉesu miaj duboj, embarasaj duboj, Sinjoro Profesoro. Mi ne povas brulstampi al la pastroj la signon de la konservativeco, la spirita mallumo, dum min ĝenas ĉi tiuj teruraj duboj. Ĉu estas permesate daŭrigi la demandojn, Sinjoro Profesoro?!
- Ĉu vere la unuajn popollernejojn fondis Johano de la Salle?
- Jes, la franco de la Salle.
- Ĉu la pastro de la Salle? La sankta?
- Tio ne interesas min.
- Kaj ĉu estas vere, ke pri la afero de la surdmutuloj unue la hispano Pedro de Ponce okupis sin kaj poste la franco Epée?
- Fakte la hispana de Ponce, kaj poste Epée!
- Ĉu la frato Ponce kaj Epée la pastro? Strange!! Do, ĉu ne estis sufiĉe, ke la monaĥo Bertoldo Schwarc eltrovis la pulvon, la monaĥo Guido d' Arezzo la gamon, la jesuito Cavaleri la polikromion, la jesuito Secchi la spektroanalizon?
- Amiko! Se vi nur venis por kolerigi min ...mil diabloj kaj fulmoj!!!
- Tute ne, sinjoro Prof.! Sed eĉ! La fulmoforigilon ne Franklin eltrovis, ĉar jam en 1754 faris fulmoforigilon Devisch Prokop, la paroĥestro. Mi legis ĉi tion ankaŭ en la leksikono de Kürschner.
- Via lango saĝe ne baldaŭ laciĝos!
- Ad vocem! La plej granda lingvomajstro de nia epoko estis la poliglota kardinalo Mezzofanti, ĉu ne? Li parolis sepdek du lingvojn, ne konsiderante la dialektojn.
- Bone, bone juna sinjoro! Estas sufiĉe! Kien vi deziras iri de tie ĉi?
- Kien? En kian direkton? Tion mi necesu demandi al Flavio Gioja kiu jam ĉirkaŭ 1300 uzebligis la kompason. Sed ankaŭ ĉi tiu estis pastro.
- Ej, ej, vi vere flamiĝis.
- Flamiĝis?! Nu kontraŭ tio nur povas helpi plej bone la ŝprucigilo. Sed do ankaŭ la unuan sprucigilon pastroj, la cistercanoj, eltrovis. Kaj la kapucenoj de Parizo estis la fajrestingistoj de Parizo, ĝis la 17-a jarcento.
- Se vi ne babiladus tiom interese, mi jam jetus vin eksteren.
- Kien? Eble en la bluan aeron? Pri tio mi ekmemoras la aersipon. Kiel mi scias, la unuan aersipon 60 jarojn antaŭ Mongolfieri, jam frato Gusmae Bertold eltrovis, kiu jam en 1720 suprenleviĝis per sia aersipo, en ĉeesto de la tuta kortego portugala.
- Sinjoro Profesoro purigas la okulvitrojn; ankaŭ tio estas eltrovaĵo de pastro. La okulvitrojn la dominikano Spina Aleksandro eltrovis.
- Sinjoro Profesoro rigardas la horloĝon?! Ĉu estas tiom urĝa via afero? Ankaŭ la horloĝo estas eltrovaĵo pastra! La unuan horloĝon konstruis Cassiodorio; kaj Gerbert, la estonta papo Silvestro II ĝin perfektigis.
- Ĉu mi tedas vin, Sinjoro Prof.? Jam mi iros.
- Ĉu vi havas ankaŭ biciklon?! Ĉi tiun mekanikaĵon la pastro Pianton eltrovis, kiu jam en 1845 iradis per biciklo.
- Kaj jen, ĉi tie, sur la tablo de l' antaŭĉambro, kuŝas ĵurnalo en la rusa lingvo. La cirilan alfabeton ankaŭ pastro verkis por la slavaj popoloj. La greka pastro sankta Cirilo kun sia frato sankta Metodo, antaŭ 1100 jaroj, konvertante la slavojn, faris por ili la alfabeton, kiun poste oni nomis laŭ li: „cirila”. — Jam vesperiĝis. Ekstere jam brulas la gaslampoj en la mistika parko. Al vi ne povas





44. *Turismaj implikaĵoj. A.* Tragedikomikan historieton rakontas nia ĉefredaktorino (kun kiu vi ekz. komparu n.40 C). Post kiam mi enŝipiĝis en Barcelono por marvojaĝo al la mediteranea insulo Ibiza (daŭro ĉ.14 horojn, ĉiam de vespere ĝis matene) mi laŭkutime iris al la kajuto por aranĝi miajn aferojn. Jam post kelkaj minutoj vokis min mia akompananto, kiu por la sama celo unue estis en sia kajuto, granda kun 12 litoj por sinjoroj: iu germana sinjoro klopodis vane ekspliki iun aferon; do mia amiko petis ke mi venu por fari interpretistajn servojn. Jam en la koridoro mi aŭdis laŭtajn kriojn kaj tra la malfermita pordo mi ekvidis grupon da sinjoroj: en la mezo alta, dika, mezaĝa germano kaj ĉirkaŭe la aliaj okupantoj de

tiu salono, kaj la ĉambristo, ĉiuj hispanoj, kiuj ne komprenis unu vorton de la germana lingvo, nek la viglajn gestojn de la sinjoro, kiu ĉiam pli laŭte kriis, evidente opiniante ke ĉiuj aliaj estas surdaj. Mi tuj komprenis lian eksciton kaj fakte la afero estis tre simpla: pro iu korpa malhelpo la sinjoro ne povis grimpi por atingi la al li destinitan liton sur la „unua etaĝo” kaj li petis malsupran liton! Per kelkaj vortoj mi povis klarigi la situon kaj peti, ĉu alia sinjoro estos preta al interŝanĝo, sed iom malice mi mem volis fari la aferon ankoraŭ pli komplika, samtempe profitante la okazon por fari iom da propagando por nia movado... (kial ne ??). Do unue mi silentigis la germanon, dirante en ties lingvo ke mi aranĝos por li la aferon, tiam turnis min al mia akompananto por ekspliki al li la aferon en Esperanto; siavice li transdonis la eksplikon hispanlingve al la ĉambristo kaj la aliaj hispanoj, el kiuj tuj 2-3 „malsuprujoj” pretis cedi sian lokon; la ĉambristo faris decidon, komunikis ĝin hispanlingve al mia amiko, kiu gravmiene tradukis ĝin por mi— tute superflue — en Esperanton, kaj mi informis la germanon, kiu estis tre kontenta. Mi demandis min, ĉu la germano estus daŭriginta siajn protestojn dum la tuta nokto, aŭ estus forlasinta la boaton lastmomente, se neniu interpretisto estus prezentinta sin?

45. *Turismaj implikaĵoj. B.* Sro Kronshage transskribis el *Westdeutsche Rundschau* 10-4-61: „Sabate aŭto karambolis en W. La ŝoforo de tiu aŭto, verŝajne germano, fuĝis post la akcidento. La tri kunveturintoj, italoj, pro manko de interpretisto ne povis sufiĉe rapide kaj samtage esti pridemandataj de la polico!” (Rim.: oni komparu i.a.n. 18 kaj 20).

46. Vi certe legis pri *diplomatiaj malfacilaĵoj* kiuj ekkreskis el „malgranda miskompreno” de la franca lingvo de nia Papa Moŝto Johano XXIII, kiu antaŭtempe anoncis la gravecon de la belga Reĝino Fabiola; ni ĝoju ke en tiaj aferoj la papo ne estas neeraripova! Tamen ni scias, ke kiel diplomato en Francujo li bone lernis la francan lingvon...

Atentaj samideanoj: vi nepre sendu viajn interesaĵojn (nur) al

*paroĥestro C. A. Ouwendijk, Rijpwetering, Nederlando.*

---

esti nekonata, ke la gasflamon la jesuitoj eltrovis, tiuj homoj ŝatantaj mallumon. Unuafoje en la jaro 1794 oni aplikis ĝin en Stonyhorst (Anglujo).

— Ĝis revido Sinjoro Profesoro.

— Sed do jam iru! tie venas tramo, per kiu vi povos rapide foriĝi.

— Jes, jes. Ankaŭ la dinamon pastro eltrovis. Kvar jarojn antaŭ Siemens la hungara benediktano Jedlik Anyos!

— Sinjoro Profesoro bonan nokton!

*Ludoviko Kóbor.*

## ESPERANTO EN LA GAZETARO

S-ro *Luis Ramirez Teruel* en *Huete (Cuenco)* *Hispanujo* sendis al ni grandan artikolon de 3 kolonoj el la ĵurnalo „*Ofensiva*” de sia urbo (18.5.61) pri *Esperanto, la lingvo internacia*, verkitan de s-ro *Pablo Redondo*, entuziasma idealisto, kiu multe propagandas nian aferon. En la sama ĵurnalo jam aperis du artikoloj, kaj la serio estas daŭrigota. —

S-ro *Sacramento Collado Llana* en *Sama de Langreo (Oviedo)* *Hispanujo* sendis la gazetojn „*Signo*”, 20.5.61 kaj „*Ecclesia*”, 27.5.61 ambaŭ aperantaj en *Madrid*, kiuj enhavas detalajn komunikojn pri la apero de la Evangelioj en Esperanto, kiel aldono de *Espero Katolika*. \*

S-ro *W. Mudrak*, *Vieno*, sciigas, ke „*Oesterreichisches Klerus-Blatt*” — duonmanata revuo por sacerdotoj, aperanta en *Salzburg* raportas 27.5.61 en sia rubriko „*El la Eklezio de hejmlando kaj tutmondo*” pri la eldono de la Nova Testamento en Esperanto; pri Diservo kun Esperanto-prediko kaj unua sankta Meso de Patro *Carlo Cecchitelli*, Romo.

Samtempe S-ro *Mudrak* komunikis, ke „*Der Seelsorger*” (La Animprizorgisto), grava monata gazeto por ĉiuj kampoj de pastreca laboro de la Regno de Dio eld. *Wien*, I., *Stephansplatz 3*, enhavas en sia nro de marto 1961 konsiderindan preskaŭ 2 paĝan artikolon „*Esperanto im Dienste der Weltkirche*” (Esperanto en la servo de la tutmonda Eklezio) de *paroĥestro W. Flammer, Urnäsch, Svislando*. En la trafa traktaĵo ankaŭ *IKUE* estas menciita kaj ĝiaj reprezentantoj en *Svislando*, Germanujo kaj Aŭstrujo, ...kvankam la redakcio antaŭmetis rezerveman rimarkon: „*Tiun nepostulite alvenintan voĉon oni almenaŭ povas aŭskulti, ankaŭ se oni ne centprocente konsentas al ĝi!*” La valoro de la koncerna artikolo estas taksinda. — Fakte nia s-ano Patro d-ro *Suibert Siedl O.C.D.* jam direktis funde argumentantan leteron favoran al nia internacia lingvo Esperanto al la redakcio. (Mem regante bonege latinon kaj sufiĉan nombron da naciaj lingvoj li, parte uzante citaĵojn en latina lingvo, vere unike, lerte kaj tamen mirinde modeste, pledas por Esperanto.)

Sed lia ekzemplo devus trovi imiton. Aliaj el niaj altŝatataj sacerdotoj sekvu lian modelan ekzemplon! \*

### *Ni gratulas*

...al nia kara samcelano, Resp. *Patro Bruno Hebenstreit O.F.M.*, je lia 25jara sacerdota jubileo la 26an de julio 1961. Antaŭ 25 jaroj li ankaŭ faris sian unuan predikon en Esperanto, I.a. li povis partopreni la kongreson en *Bologna* (1955) kaj travivi la signifoplenan tiean solenon kaj akcepton okaze de la veno de lia kardinala moŝto ĉefepiskopo *Lercaro*. Dum nia XXVIIa en *Vieno* ni ĝuis lian belegan predikon okaze de vizito al *Maria-pilgrimloko*. Ni deziras pluan benplenan agadon ankaŭ por kaj per Esperanto.

En la komenco de julio 1961 celebros sian unuan sanktan Meson nia fervora samideano *Patro Karlo Bašić O.F.M.*, Put zrtava faŝizma 1, *Makarka, Jugoslavio*. Ni prezentas niajn korajn gratulojn al la nova sacerdoto kaj preĝas por ke Dio riĉe benu lin kaj lian apostolan laboron.



## PAC-MISIO DE ANTHONY BROOKE

### lasta rajao de Seravako (nord-okcidenta parto de la insulo Borneo)

En la raporto pri intervjuo, kiun aranĝis granda haga ĵurnalo, ni povis legi: „S-ro Anthony Brooke estas rimarkinda homo; rimarkinda pro sia pasinteco kaj ankaŭ pro la tasko, kiun li donis al si mem. S-ro Brooke estas ja rekta posteulo de James Brooke, kiu en 1841 fariĝis rajao de Seravako. Tri sinsekvaj generacioj de lia familio regis super la sendependa kaj suverena ŝtato de Seravako, rekonita kiel tia de Usono en la jaro 1851, de Britujo en 1863. Poste Seravako fariĝis brita kronkolonio en 1946.”

Dum pli ol cento da jaroj James Brooke kaj la sekvintaj rajaoj el la familio Brooke regis Seravakon kiel suverenaj ŝtatestroj. Ilia firma, sed justa kaj humana reĝimo mildigis la morojn de la primitivaj indiĝenoj, ĉesigis la kutimon de „kapĉasado”, kondukis la popolon sur la vojon de la civilizacio kaj fariĝis ĉiurilate benoplena por la tuta lando. Kiam Anthony Brooke ne plu havis taskon en Seravako, li reiris en Britujon.

Tiam li decidis dediĉi sian vivon al la interpaciigo de la popoloj de la tuta mondo. Li komencis fari mondvojaĝon kaj vizitis ne nur la okcident-eŭropajn landojn, sed ankaŭ la Mez-Orienton, Hindujojn kaj Ĉinujojn. En Hindujo li akompanis dum tuta semajno la plej gravan disĉiplon de Gandhi, la popolgvidanton *Vinoba Bhave*, kiu piede iras de vilaĝo al vilaĝo por akiri senpage terpecojn por la popolo. Li parolis ankaŭ kun *Jawaharlal Nehru*, ĉefministro de Hindujo, kun *U Nu*, ĉefministro de Birmo, kaj kun *Ĝu Enlaj*, ĉefministro de Ĉinujo.

En majo 1960 s-ro Brooke kunvokis konferencon en Ĝenevo (Svislando) por aŭdi la opiniojn de diverslandaj kaj diversreligiaj homoj, laborantaj por la paco. Dum tiu konferenco, en kiu partoprenis ankaŭ *Prof. Edmond Privat*, li konvinkiĝis pri la granda utileco de Esperanto, kaj poste li partoprenis en la seminario de *Andreo Cseh* en Bruselo.

Post Bruselo li vojaĝadis al Danujo, Svedujo, Finnlando, Rusujo, Polujo, Ĉeĥoslovakio, Hungarujo kaj Orient- kaj Okcident-Germanujo. Lia ĉefa celo estas fari paroladojn por gejunuloj de ĉiuj landoj kaj konvinki ilin pri la neceseco de interpaciigo kaj komuna laboro por paca mondo. Krom tio li vizitadas la ŝtatestrojn kaj donas intervjuojn al la gazetaro. Oni tre bone akceptis lin en la popoldemokratiaj landoj. Li donis kristan-pacifistan mesaĝon en kvar preĝejoj, du en Polujo kaj du en Ĉeĥoslovakio. En Budapeŝto li faris radio-paroladon.

Ĉar certe multaj esperantistoj interesiĝas pri tiu paclaboro, ni invitis s-ron Anthony Brooke por paroli pri ĝi en la kunveno de Universala Ligo en Harrogate. Li faris la sekvantan deklaron:

*„Mi spertis, ke mi ne povos sukcese daŭrigi la plenumadon de mia elektita tasko, se mi ne regos perfekte la lingvon Esperanto. En mondo, kies popoloj estas tiel dividitaj de la registaroj, estas urĝe necese, ke la popoloj mem unuiĝu kaj kune agu; unu el la plej efikaj rimedoj por unuigi ĉiujn popolojn de la mondo estas komuna lingvo. Tio estas la unua postulo kaj tial mi decidis funde ellerni Esperanton antaŭ ol mi daŭrigos miajn vojaĝojn.”*

*La estraro de UNIVERSALA LIGO kore invitas ĉiujn kongresanojn al la UL-kunveno en Harrogate por aŭdi interesan paroladon en Esperanto de S-ro ANTHONY BROOKE, membro de U.E.A. kaj Aktiva Membro de Universala Ligo. La loko kaj horo de la kunveno estas indikitaj en la Kongresa Programo.*

## ESPERANTO VIVAS

**AŬSTRUJO.** La membroj de la IKUE-sekcio AKLE ĉiam fervore laboras kaj regule kunvenas. Ili ankaŭ zorgas, ke en la gazetaro aperas artikoloj pri Esperanto kaj sciigoj pri nia movado (vidu la koncernan rubrikon). — La



ĝenerala kunveno de la *Aŭstria Esp. Federacio*, de kiu AKLE estas sekcio, okazis la 28an de majo pasinta. Dum la Sta. Meso en la bela kapelo de la Federacia Domo de Malsupera Aŭstrujo (*N.O. Landhaus*, en kiu okazis la labor-kunsido de nia IKUE-kongreso 1958) Patro Bruno Hebenstreit OFM predikis pri la sendo de la laikoj en la mondon kaj la uzo de Esperanto por plenumi tiun taskon. Post la Diservo oni faris

foton; en la mezo de la grupo staras Patro Hebenstreit — kiu festos jubileon 26.7.61, vidu sub „Ni gratulas” —. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de AEF, financ-direktoro *R. Cech* kaj edzino. —

En Vieno oni inaŭguris antaŭ nelonge Zamenhofstraton. —

Nia malnova, ĉiam fervora membro *d-ro Karl Friedl* faris propagandan paroladon en la „Vinzentinum” en *Graz*; sekve de tio nia juna, sed jam grandmerita s-ano *Klaus Perko* nun gvidas Esperanto-kurson por 25 studentoj. \*

**BRAZILLO.** Jam kelkfoje ni raportis pri la Seminariista Esperanto-Grupo „Semo” en *Monte Santos de Minas, M.G.* (poŝtfako 34), kies motoro estas la teologi-studento *Frato Severiano de Souza SSS*. Li nun starigis duan Esperanto-grupon, por gestudentoj kaj aliaj personoj, nome: „Eymard Esperanto-Klubo”, kun sidejo en la Teknika Lernejo de Komerco, kies direktoro estas granda simpatianto de Esperanto. La anoj de EEK organizis feston la 31-an de majo, kiun ĉeestis 200 personoj: inter ili la Urbestro kun edzino, kvar urbaj konsilistoj, kelkaj geprofesoroj, kuracistoj kaj tri profesoroj de la Seminario. Aktive partoprenis



knaboj kaj knabinoj, kiuj ankaŭ deklamis, kantis kaj eĉ organizis teatraĵojn. Nun ankaŭ estas fondita „Infana Esperanto-Klubo”, kun helpo de kelkaj instruistinoj: pluraj 9-10jaraj infanoj membriĝis.

La 23-an de julio okazos oficiala vizito de Esperantistoj el aliaj urboj, okaze de la dua datreveno de SEMO kaj la unua de EEK. Sendu gratulleterojn kaj il. p.k. al supre menciita adreso, por rekompenci niajn tieajn gesamideanojn por ĉio kion ili faras por nia movado kaj instigi ilin al daŭra fervoro.

La unua foto montras parton de ekspozicio okaze de la unua datreveno de SEMO kun *Fr. Severiano*; sur la dua vi vidas grupeton da esperantistoj, kiuj sub gvido de *Patro Nelson* kantis „La Espero” kaj aliajn kantaĵojn dum tiu festo.

**NEDERLANDO.** La *Federacio de Laboristaj Esperantistoj* organizis kongreson dum Pentekosto en *Amsterdam* por festi sian oran jubileon. Ĉeestis la *Ŝtata Ministro D-ro W. Drees*, kiu prelegis en Esperanto. Li rakontis pri siaj spertoj dum internaciaj kunvenoj, kie oni ne uzas Esperanton, sed interpretistojn kaj multekostajn tradukstemojn, kio ofte liveras nekontentigajn rezultatojn. D-ro Drees akcentis la diferencon inter tiaj internaciaj konferencoj kaj niaj Esperanto-kunvenoj, kie pro la rekta kontakto kaj foresto de lingvaj malfacilaĵoj la interŝanĝo de pensoj estas pli facila, pli vigla kaj pli spontana. Lia Ekscelenco juĝas la enkondukon de Esperanto en la lernejojn tre grava kaj utila afero. \*

**USONO.** Nia fervora usona reprezentantino, *S-ino Eleanor McGrogan* instruas Esperanton kaj en sia hejmo ricevas lernantojn por konversacia kurso. Ŝi ankaŭ estas la administrantino de skriba kurso, kiun aranĝis la klubo de sia urbo *Warren, Ohio*:

Nia membro *Patro Stephen Sinnick*, en *Power, West Virginia*, gvidas porjunulan Esperanto-kurson en sia paroĥo. Por *Patro Sinnick* Esperanto ne estas nura ideo aŭ celo, sed praktika ilo, sen kiu li ne povus korespondi kun kolegoj kaj amikoj en la tuta mondo, eĉ en Orient-Eŭropo. \*

**HISPANUJO.** La konata Esperanto-Eldonisto *J. Régulo Pérez* en *La Laguna*,



*Tenerife* skribas ke okaze de la pasinta festo de Korpo de Kristo la Esperantista-Societo de lia urbo jam la duan fojon efektive kontribuis al la procesio. Tie nome estas kutimo (kiel cetere ĉie en Hispanujo), ke ĉiuj stratoj, tra kiuj pasas la procesio de Korpo de Kristo, estas kovritaj de flortapiŝoj, al kiuj la loĝantoj de tiuj kaj flankaj stratoj dediĉas multajn horojn por prepari grandiozan akcepton al la S. Eŭkaristio. La tapiŝoj preskaŭ ĉiam enhavas motivojn rilate al la granda solenaĵo. La Esperantista Societo de *Tenerife* havas sian sidejon en strato, kiun trairas la procesio; la foto montras la flortapiŝon kiun la membroj faris por la unua de julio 1961. \*

En *Barcelona* okazis la XIIIa internacia kongreso de la Internacia Federacio Esperantista Fervojista, kiu havas 2500 membrojn, en majo pasinta. La gazetoj (bedaŭrinde la eltranĉaĵoj ne mencias la nomon de la gazetoj) ĉiutage enhavis raportojn, laŭ kiuj parto-

prenis 650 fervojistoj el 13 landoj, eĉ el Finnlando. Ĉeestis multaj eminentuloj, okazis akcepto en la urbdomo, ekskursoj, kaj kompreneble laborkunsidoj kaj prelegoj, i.a. de la ĉefo de Hispanaj Fervojoj RENFE, el *Madrid*, s-ro *Rodriguez Escartin*, pri fakaj aferoj. —

La ĉiam vigla Esperanto-Grupo de *Moyá* (prov. Barcelona) aranĝis prelegon kun koloraj diapozitivoj de *D-ro Johano Hamvai*, la IKUE-reprezentanto por Nov-Zelando, kiu kun sia edzino faras vojaĝon tra Eŭropo. Kelkcent personoj plenigis la salonon de la loka biblioteko por aŭskulti la prelegon pri tiu plej malproksima lando. Por la ĉeestantaj ne-esperantistoj la prelego estis tradukata en katalunan lingvon. *D-ro Hamvai* havis sukceson neniam atingitan. \*

**MOZAMBIKO.** En majo pasinta nia samideano *Horácio de Jesus Henriques* okazigis Esperanto-Ekspozicion en la salono de la Katolika Laborista Junularo en *Nampula*, kie ankaŭ estis organizita ekspozicio pri la libro katolika kaj pentraĵoj, desegnaĵoj, brodaĵoj ktp. verkitaj de la membroj de tiu organizo. La inaŭguron ĉeestis la distriktestro, la episkopo de *Nampula*, civilaj kaj militistaj aŭtoritatuloj, kiuj atente rigardis la ekspozitajn esperantaĵojn. Multaj personoj vizitis la ekspozicion, kaj ekhavis bonan ideon pri nia movado. Bedaŭrinde la iniciatinto s-ro *Henriques* estis kaj estas grave malsana, sed malgraŭ tio streĉis siajn fortojn por atingi sian celon. — La foto montras angulon de la ekspozicio: tute maldekstre oni vidas kelkajn numerojn de *Espero Katolika*, pendigitajn en formo de Kruco.



Sinjoro, kiu sentas sin tre grava persono, al junulo kiu venas peti la manon de lia filino, je sufiĉe mal-estima tono:

— Do, juna viro, vi deziras esti mia bofilo.

— Fakte mi ne deziras tion, sinjoro, sed mi ne vidas la eblecon, eviti tion. Mi tamen deziras edziĝi kun via filino.



## 46-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Harrogate - Britujo  
5-12 aŭgusto 1961

ALTA PROTEKTANTO:  
LORDO BOYD-ORR, M.A., M.Sc.,  
F.R.S. NOBEL-PACPREMIITO

**Korespondadreso:** 46-a Universala Kongreso de Esperanto - Harrogate.  
**Telefono** : Harrogate 4685  
**Telegrafo** : Esperanto Harrogate.  
**Banko** : Midland Bank Ltd. Harrogate

### OFICIALA KOMUNIKO

Junio 1961

**STIPENDIOJ:** Sveda Esperanto-Junulara Unuiĝo decidis asigni du stipendiojn de 250 sv.kr por partopreno en la Kongresoj de Harrogate kaj Wokingham al du junuloj ĝis 20 jaroj, kiuj gajnos specialan konkurson.

**JUGOSLAVA ENSEMBLO:** L.K.K. invitis la jugoslavan ensemblon „Branko Cvetković” el Beograd, prezenti en la kadro de la Arta Festivalo spektaklon de jugoslavaj folkloraj dancoj kaj kantoj. La ensemblo konsistas el 39 ludantoj.

**LIBERVOLA PREZENTADO:** La Internacia Arta Teatro anoncas, ke en la kadro de la libervola spektaklo „Modernaj unuaktaj teatraĵoj” ĝi ludos en Esperanto jenajn verkojn: „La homa voĉo” de J. Cocteau, „Maneken-Parado” de M. Boulton kaj „La respektinda p...” de J. P. Sartre.

**ALVENO EN HARROGATE:** Kvankam la unuaj kongresaj programoj komenciĝos nur sabaton posttagmeze, estas konsilinde, ke ĉiuj kongresanoj, kiuj povos tion fari kaj kiuj laŭe rezervis ĉambron en hotelo, alvenu al Harrogate jam dum vendredo, por eviti troan amasiĝon de la alfluo de la kongresanaro. La akceptejo en la stacidomo funkcios ek de vendredo kaj en la kongresejo ĉiu alveninto povos tuj ricevi siajn dokumentojn.

**FRUALVENINTOJ:** Kongresanoj, kiuj atingos Harrogate antaŭ vendredo povos renkonti unu la alian en la speciale organizita renkontejo, la kafeja salono de la Reĝa Banejo (Royal Bath) en Parliament Street.

**KONGRESA LIBRO:** La Kongresa Libro estos sendita al ĉiu aliĝinto ek de la fino de junio. Al kongresanoj loĝantaj en ekstereŭropaj kontinentoj la libro ne estos sendita, sed transdonita je alveno en Harrogate.

**STATISTIKO:** Ĝis la fino de majo anoncis sin 1436 kongresanoj el 35 landoj. La nuna estas la lasta komuniko: la Kongresa Komitato deziras al ĉiu kongresano bonan vojaĝon al Harrogate.

G. C. Fighiera,  
Konstanta Kongresa Sekretario

## SEMINARIO „ORIENTO — OKCIDENTO”

sub aŭspicioj de U. E. A. kaj de la Londona Esperanto-Klubo  
University College London, Gower Street, LONDON, W.C. 1... 2-4.VIII.1961  
Korespondadreso: 1, Poet's Road, Highbury, LONDON, N.5, Britujo.

### P R O G R A M O

#### *Merkredo, 2. Aŭgusto:*

- 09.30 Malfermo de Seminario:  
N. R. Smith, B.Sc., Wh.Sc., A. M. I. Mech. E.
- 10.00 La aktuala laboro de UNESKO en la realigo de la Granda Projekto „La Reciproka Aprecado de Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj Valoroj”: Prof. D-ro I. Lapenna, „Research Fellow” ĉe London School of Economics and Political Science, antaŭe Profesoro de Internacia Juro en la Universitato de Zagreb.
- 11.15 Eŭropano rigardas Japanujon:  
Lic. Tibor Sekelj, konata esploristo, verkisto kaj vojaĝinto.
- 12.30 Paŭzo por laŭvola lunĉo.
- 14.00 Impresoj de Libano, Etiopio kaj aliaj landoj de la Proksima Oriento:  
D-ro P. Neergaard, antaŭe Profesoro en la Usona Universitato de Bejrut.
- 15.15 Libera Diskuto: „Problemoj en la uzado de Esperanto de Orientaj popoloj kaj ĝia apliko al la Reciproka Aprecado de Kulturaj Valoroj”: enkondukos N. Barnes, B. A., lingvisto antaŭ nelonge reveninta el Ĉinujo.
- 17.00 Bendoj de Azia Muziko kun klarigoj.
- 19.30 Renkontiĝo en la Antaŭkongresa Akceptejo ĉe Royal Hotel por kuna ekiro al Ĉina Restoracio (proksimuma kosto 15 ŝil. sen trinkaĵoj)

#### *Ĵaŭdo, 3. aŭgusto:*

- 09.30 La influo de la Okcidento sur la pensmanieroj de Japanoj:  
Prof. D-ro Hideo Yagi, Rektoro de Universitato de Okayama.
- 10.15 La Kulturo de Hindujo: Lic. Tibor Sekelj.
- 12.00 Film-prezentoj kun Esperantaj komentarioj.
- 13.15 Kuna ekiro al lunĉo en Hinda Restoracio (proksimuma kosto 10 ŝ.)  
(aŭ lunĉo laŭvole)
- 15.00 Kultura Renaskiĝo en Ĉinujo: N. Barnes, B.A.
- 16.30 La influo de Okcidenta Kulturo en la Proksima Oriento:  
D-ro P. Neergaard.
- 18.00 Fermiĝo por libera vespermanĝo antaŭ partopreno en la Antaŭkongresa Balo.

#### *Vendredo, 4. aŭgusto:*

- 09.30 Renkontiĝo ĉe Akceptejo de la Antaŭkongreso en Royal Hotel por kuna vizito al la Brita Muzeo (Orientaj Sekcioj).
- 12.30 Lunĉo laŭvola.
- 14.00 La Prahistorio de Afriko: Lic. Tibor Sekelj.
- 15.15 Libera Diskuto: „La rolo de Esperanta tradukita kaj originala literaturo en la Interŝanĝo de Kulturaj Valoroj”: enkondukos V. Sadler, B.A.
- 16.30 Fermo de Seminario.

PRINCO BERNHARD DE LIPPE, el NEDERLANDO, PREZIDOS EN LA FRANCA UNIVERSITATA URBO TOULOUSE, en SEPTEMBRO, LA KONGRESON DE LA STUDENTOJ DE LA EŬROPA JUNULARO.

Per sia numero de la 2a de Junio 1961, la plej grava tuluza gazeto LA DEPECHE DU MIDI informis sian legantaron, ke de la 25a ĝis la 30a de septembro 1961 okazos en Tuluzo suprenomita kongreso, kun partopreno de la plej elstaraj eminentuloj.

La oficiala celo de tiu kongreso estas „RELIEFIGI LA NORMOJN DE LA EŬROPA KULTURO KAJ LA HOMAN KONDUĜON ANTAŬ LA NUNTEMPA VIVO”. Krome, kvar ĉefaj partoj estas jam difinitaj en la programo de tiu Kongreso:

- 1) Bilanco kaj geopolitikaj faktoroj de Eŭropo.
- 2) Estonteco de la eŭropa ekonomio.
- 3) Bazaj politikaj liberecoj.
- 4) Kulturo kaj tekniko.

Post konsiliĝo kun S-ro D-ro ALBAULT, Prezidanto de la Esperantista Tuluza Grupo, ni decidis:

A) Diskonigi per ĉiuj eblaj rimedoj: esperanta gazetaro, cirkuleroj, personaj kontaktoj ktp. la datojn kaj konitajn faktorojn pri tiu kongreso, incitante la esp. gestudentojn partopreni en ĝi.

b) Inviti la eventualajn partoprenontojn ekrileti — kiel eble plej baldaŭ — kun D-ro ALBAULT, 8 Avenue Etienne Billières, TOULOUSE; li certe organizos tiam kontakton en Tuluzo por la esperantistoj.

c) Peti la helpon de ĉiuj esperantistaj Asocioj kaj Organizaĵoj por ke la esp. partopreno al tiu kongreso estu kiel eble plej grandnombra kaj brila.

Ĉar 400 gestudentoj pri diversaj fakoj, venintaj de 18 landoj de la Okcidenta Eŭropo, partoprenos tiun manifestacion, estas antaŭvidinde, ke la lingvo-problemo ebligos la atenton al esperantista delegitaro, se nur ĝi konsistos el kapablaj kaj seriozaj delegitoj!

#### 40 JAROJN PAX ROMANA.

Pri tio memoris la Aŭstriaj membraj federacioj de tiu universala supernacia studenta organizo, „Aŭstria Altlerneja Junularo” kaj „Aŭstria Kartel-federacio” per solena akto en la malgranda festsalonego de la Viena Universitato la 5.5.1961.

Ĉeestis eminentaj gastoj, ankaŭ eksterlandaj. Instruministro d-ro Drimmel deklaris, ke ne necesas serĉi la pli bonan ideon, ĉar ni ja havas tiun pli bonan ideon. Ni nur devas ekkapti kaj realigi ĝin. —

Se la eklezio perdis la laboristojn, ĉar la kristanoj pensis, povi solvi la socian problemon per bonfaremo, tiel ĝi perdos la indiĝenajn (kolorajn) popolojn, se ni konsideras „kelkajn monerojn” sufiĉaj por la „kompatinda nigruleto”.

---

*Lastmomenta aldonajo:* La Seminario inkluzivos ankaŭ prelegon de D-ro Rokuro Makabe (Japana): temo decidota.

Seminarianoj rajtas ankaŭ partopreni kiun ajn programeron de la Antaŭkongreso, kiel alternativon. *Kotizo:* 75 ŝil. (150 steloj), kiu inkluzivas loĝigan servon, sed ne la koston de loĝado, manĝado aŭ ekskursoj. Por havi aliĝilon, skribu tuj al la Sekretario ĉe 1, Poet's Road, Highbury, LONDON, N.5, Britujo.

## NI RECENZAS

*A VIDA DE ZAMENHOF (INICIADOR DO ESPERANTO)*. El la *konata* originalo de *Edmond Privat* tradukis en portugalan lingvon *Alberto Bonfim*. Eld. *Cooperativa Cultural dos Esperantistas, Rio de Janeiro, Brazilo*. 18,5 x 13,5 cm. 174 pĝ. ilustrita. Prezo ne menciita. — Estas bona ideo, eldoni tradukon de la *Vivo de Zamenhof* en Brazilo, kie, certe ankaŭ pro la subteno de la Ŝtato, nia movado rapide progresas kaj ne estas kvazaŭ nekonata: tia verko povas konvinki personojn, kiuj ankoraŭ ne decidis lerni nian lingvon, pri la graveco de nia afero, al kiu humana scienculo dediĉis sian tutan vivon. \*

INFANLIBRETOJ: 1. La ratkaptisto el Hameleno. 2. Vespero en la cirko; 3. Pli kaj pli rapide; 4. La kuraĝa tamburisteto; 5. Kun niaj amikoj, la Bestoj; 6. Orharulo kaj Ruĝakresto; 7. Aladino kaj la mirinda lampo; 8. Kaj nun ni eklaboru; 9. Kampomuso ekskursas; 10. Eta plumba soldato. — Ĉiu libreto enhavas 12 paĝojn 16 x 17 cm. kaj kartonan kovrilon; sur ĉiu paĝo kaj kovrilo troviĝas freŝaj, belaj, multkoloraj ilustraĵoj. La tekstoj estas en bona, simplastila Esperanto kaj certe ĝojigos niajn infanojn, eĉ taŭgas por komencantaj plenkreskuloj. La *Esperantaj Francaj Eldonoj en Marmande, Francujo*, kiuj jam eldonis multajn bonegajn instrulibrojn pri niaj lingvo kaj movado, gramofondiskon por la prononco, ktp. per ĉi tiuj ĉarmaj libretoj certe faras utilan servon al la gepatroj kaj instruistoj. La libroj estas haveblaj ĉe nia Libro-Servo; prezo po f 0,85 = 3,40 steloj; la 10 div. ekz. kune f 7,50 = 30 steloj.

GEOGRAFIA REVUO, 4-a Jaro No. 4, Majo 1961. 36 pĝ. 23,5 x 17 cm. Ĉi tiu ilustrita revuo, organo de la Internacia Geografa Asocio, redaktita de s-ro *Lic. Tibor Sekelj*, nur malofte aperas, sed ĉiu kajero enhavas bonegajn, seriozajn artikolojn de scienculoj. La 4-a kajero i.a. prezentas: *Aviadile tra Afriko*, de *Aafke Haverman*; *La Konkero de Fitz-Roy*, de *Hugo Alfaro*; *Kun la Ajnoj de Hokajdo*, de *Tibor Sekelj*; *Perdita en la Praarbaro*, de *Nedeljka Subotić*, ktp. Abonprezo: 4 nroj. 1 us.dol.; unuopaj nroj.: 0,25 us.dol. = 3 resp.kup. = 4 steloj; tamen nro. 1 tute elĉerpiĝis. Adr.: Geografia Revuo, Gornji trg 31/II, Poŝtfako 18, *Ljubljana, Jugoslavio*. \*

MUZIKA TERMINARO — *M.C. Butler kaj F. Merrick*, 36 pĝ.

RADIO-TERMINARO — *A. Venture*, 36 pĝ.

KUDRA kaj TRIKA TERMINARO — *M. kaj V. Verda*, 24 pĝ.

TERMINARO POR INFAN-LUDOJ — 32 pĝ.

*Rüdiger Eichholz, Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado*, eldonis repres-ojn de la suprenomitaj fakvortaretoj, antaŭe eldonitaj de IEL/UEA kaj delonge elĉerpitaj. Pri la enhavoj ni nenion bezonas diri: ni ja scias ke ili estas bonegaj. Etlitera, tre klara preso sur bona papero, kun kelkaj desegnoj, en freŝaj, flavaj kovriloj. Prezo: po 1 ned.guld. = 4 steloj. \*

AOSTA VALO. Multkolora ilustrita faldfolio, geoplastigrafika plano de la valo en la *Italaj Alpoj*, trairata de la riviro *Dora Baltea*, kun teksto en Esperanto. Bela, klara mapo kun mencio de la altecoj de la diversaj pintoj. Ĉi tiu eldono de la *Aosta Regiona Turismoŝicejo, AOSTA, Italujo*, estas senpage havebla. Montru vian intereson, petante la prospekton per esperant-lingva poŝtkarto.

*T. Durenkamp.*



## NI FUNEBRAS

Nia multjara, fervora samideano, s-ro *Henri Herlemont*, 67 Bd. Gambetta, *Issy les Mouligneux - Seine, Francujo*, mortis la 17-an de majo pasinta. Nia reprezentanto por Francujo, s-ro *Pierre Muffang*, ĉeestis la enterigon kaj transdonis al la parencoj kondolencon ankaŭ en la nomo de IKUE. \*

El rimarko sur reveninta junia numero de E.K. ni eksciis, ke mortis nia membro s-ro *E. Semaska*, 166 Tettenhall Road, *Wolverhampton, Anglujo*. \*

S-ino *R. Olivaux*, edzino de nia fidela kaj fervora membro s-ro *Robert Olivaux*, 20bis, Rue Noire, *Nantes, Francujo*, mortis en la aĝo de preskaŭ 70 jaroj. La rekviema meso kaj enterigo okazis 2.6.61. Ni prezentas al s-ro *Olivaux* kaj ties familio niajn plej korajn kondolencojn. \*

En la aĝo de 69 jaroj mortis nia multjara fervora kaj sindona membro kaj konsulo, s-ro *Angel Llobet*, Plaza Martires 20, *Manresa, Hispanujo*. Li estis vera pioniro de nia movado kaj senlace propagandis por nia afero. Niajn plej sincerajn kondolencojn ricevu f-ino *M. Llobet*, la fratino de la mortinto. \*

Ili ripozu en paco kaj Dio konsolu la parencojn.

### Nia junularo aktivas!

La organo de nia junulargrupo LAF prosperas. Ĝi nun aperas alterne 8-paĝa kaj 16-paĝa. En la junia kaj juli-aŭgusta numeroj ĝi publikigas la (interesajn!) rezultojn de „enketo inter la Birdanoj”, laŭ kiuj ĝi aranĝos estonte sian programon. Krome ĝi elskribis artan konkurson por himno de LAF, daŭre eldonas novajn kantojn kaj publikigas interesajn konkursojn (kun premioj!) ĉiumonate. Por la IKUE-kongreso en Romo estas preparata propra LAF-programo.

Birdo komencis novan aktivecon per sia magnetofona rondo „Birdanoj pepas”, kiun povas partopreni ĉiu posedanto (aŭ disponanto) de magnetofono, ankaŭ IKUE-anoj kompreneble. Ĝi estos la stoko por posta magnetofona servo de LAF, kiu utilos al ĉiuj katolikaj esperantistoj.

Ni esperas, ke multaj gelegantoj sendos donacon al Birdo, por ke ni povu sendi nian revuon al junaj personoj en nepagipovaj landoj: la Birdo-kaso ja ne plu havas ftizon, sed refreŝigon ĉiam bonvenigas.

(Cetere: donacojn oni sendu al la landaj reprezentantoj aŭ al la administracio de Birdo. Krome ĉiu IKUE-representanto de la aliaj landoj akceptas donacojn. Sufiĉas mencii sur la ĉeko aŭ pagilo: „Birdo”).

*Stefan Maul, redaktoro de Birdo.*

### FILATELIO KAJ ESPERANTO

La 10 jara jubileo de „Oesterreichische Briefmarken-Sammlergemeinde St. Gabriel” (Asocio de poŝtmarkkolektantoj de Aŭstrio Sta Gabrielo), kies estro s-ro *Josef Franz Aumann*, Wien (VII., Zollergasse 34) E.-favora, laŭbezone ankaŭ aplikas nian lingvon, estis festata per aparta ekspozicio, montranta poŝtmarkojn kun religiaj motivoj, aranĝita en festsalonego de ŝtata presejo, Wien, I., fine de marto pasinta. Malfermis ĝin Lia Ekscelenca Moŝto la apostola nuncio *d-ro G. Dellepiane*, konfesante, ke li mem estas fervora kolektanto de tiaj signifaj poŝtmarkoj, kiuj ankaŭ servus apostolaton.

Sekvante al speciala invito, s-ano *Mudrak* ĉeestis kiel reprezentanto de la katolikaj esperantistoj. \*

# Enigmo

La leteroj sur x formas proverbon

1. x . . . . . besto
2. . x . . . . parto de la korpo
3. . . x . . . frukto
4. . . . x . . koloro
5. . . . . x . absolute necese
6. . . . x . . granda komerca kunveno por montri kaj vendi varojn.
7. . . x . . . insekto
8. . x . . . . regi
9. x . . . . . birdo
10. . x . . . . senorda konfuzo
11. . . x . . . metala aŭ leda kapŝirmilo
12. . . . x . . esti en bona aŭ malbona sanstato
13. . . . . x . prilabori la teron
14. . . . x . . speco de bovo, vivanta en Afriko kaj Azio.
15. . . x . . . monero
16. . x . . . . diri aŭ fari ion por amuzi kaj ridigi.
17. x . . . . . serioza
18. . x . . . . ŝipeto
19. . . x . . . seka sengrajnigita trunketo de greĥo
20. . . . x . . pereci per sufokiĝo en akvo
21. . . . . x . forte intense aŭdebla
22. . . . x . . batado de la arterioj kaŭzita de la sangofluo.

*Li de Jong-Roobeek*

## INTERNACIA KORESPONDSEKVO IKS ebligas korespondadon por ne-esperantistoj.

Amikiĝo inter homoj de diversaj nacioj estas dezirinda celo, tamen neatingebla por la plej multaj homoj, ĉar ili ne scias iun alian lingvon. Al tiuj homoj volas helpi la IKS-servo.

IKS-Landa-Ofico akceptas leterojn de ĉiu en sia nacia lingvo, tradukas ilin esperanten kaj sendas ilin al fremda lando, kie la tiea Landa-Ofico plu-tradukas en la nacian lingvon de la ricevonto. Tiu pagas nenion. Nur la forsendanto pagas malgrandan sumon, por ke ankaŭ junuloj kaj malriĉuloj povas leterŝanĝi.

La IKS-Centra-Ofico en *Crailsheim* organizis reton de Landaj-Oficoj kun perantoj (kiuj tradukas kaj peras adresojn) en multaj landoj, ĝis nun en Alĝerio, Aŭstrujo, Egipto, Finnlando, Francujo, Hindujo, Israelo, Italujo, Japanujo, Suda-Koreujo, Svedujo, Svisujo, USA kaj Germanujo. Ni serĉas kunlaborantojn en ĉiu lando, ankaŭ en la supre nomitaj. La perantoj (tradukantoj) eĉ ricevas malgrandan pagon por ĉiu tradukenda letero kaj servas kaj al privata, amikeca korespondado kaj al komerca uzo.

IKS laboras kun scio kaj konsento de UEA.





*Teologia studento deziras korespondi kun alilandaj teol. studentoj. Adreso: Gabrielo Horváth, Bartók Béla 5, Zalaegerszeg, Hungarujo. \**

*Intelektulino 30-jara deziras korespondi kun inteligenta katolika samideanino el Francujo kaj kun gesamideanoj el: Nederlando, Hispanujo kaj Gundičiĉeva 56/1, Slavonski Brod, Jugoslavio. \**

Usono. Skribu al: *F-ino Zdenka Hag*, Jugoslavio.

Ankaŭ en la nomo de mia edzino mi kore dankas al ĉiuj, kiuj sendis gratulojn okaze de nia geedziĝo. La multaj bondeziroj, pruvante veran amikecon de eĉ nekonataj samideanoj en pluraj landoj, vekis la miron de la gastoj kaj do certe estis propagando por nia afero. Pardonu, ke mi ne persone povas respondi al ĉiuj, *Francisco Tur Ricra, Ibiza, Hispanujo. \**

Okaze de la *XVIIa Brazila Kongreso de Esperanto* de 7-14 okt. 1961 ni aranĝos grandegan kaj imponan Esperanto-Ekspozicion. Bonvolu sendi ĉiuspecajn esperantajojn al nia adreso: *A. Borges de Medeiros 929, Apt.82, PORTO ALEGRE, Rio Grande do Sul, Brazilo.*

*La Internacia Katolika Inĵormejo* donas senpage informojn al nekatolikoj kaj sendas al ili sian dumonatan revuon „Vojo Vero, Vivo”. La katolikoj bonvolu subteni tiun belan apostolaton per mondonacoj kaj/aŭ abono je V.V.V. kies abonprezo estas 2,50 ned. guld. = 10 steloj jare. Nederlandanoj pagu al la sekretario de I.K.I. Gasthuisstr. 68, TILBURG, poŝtkonto 268507. Por eksterlandanoj la adreso estas: Sac. H. Roosen S.C.J., redaktoro VVV, Huize „St. Gerlach”, *HEER (L)*, Nederlando, poŝtkonto 134120. Ĉiam indiku por kiu celo via pago estas destinita. La landaj perantoj de I.K.I. kaj eventuale la reprezentantoj de IKUE/E.K. volonte akceptos pagojn.

*Alvoko de Pilgrimantino.* Je la 26a de aŭgusto mi pilgrimos al la „Sankta Lando” dum 25 tagoj. Estas mia deziro renkonti multajn samidean(in)ojn por pruvi al mia karavano la taŭgecon kaj utilecon de nia Esperanto. Ĉu mia propono estos bone akceptata? Mi (se eble) volonte plenumos iun ajn taskon. Skribu al: *Prof-ino Rose Maudente, Via Belmeloro 7, Bologna, Italujo.* Nepre mi respondos al ĉiuj.

Mi vojaĝos per aŭtobuso. Tranaktadoj en: *Zagreb — Beograd — Sofja — Edirne — Istanbul — Ankara — Adana — Aleppo — Damasco — Jerusalem.* Vizitoj kaj tagmanĝoj: *Ljubljana — Brod — Plovdiv — Bolu — M. Taurus — Iskenderun — Homs — Amman.* Ĉie dum la iro kaj reiro, do dufoje. \*

---

Tiel IKS estas samtempe idealista kaj praktika afero. IKS utiligas Esperanton al ne-esperantistoj, ĉar multaj personoj pro iaj kaŭzoj ne povas lerni Esperanton, sed tamen volas kontakti kun eksterlandanoj. Kial ne helpi al ili per Esperanto? Certe ni varbos multajn el ili por nia lingvo per nia IKS-servo.

Ni petas vin, la Esperantistojn, kunlabori. Bonvolu peti detalojn al IKS-Centra-Ofico, *Crailsheim-Germanujo*, poŝtkesto 39.



**RADIO VARSOVIO** elsendas ĉiutage de 16.30 - 17.00 M.E.T. duonhoran programon en Esperanto sur mallongaj ondoj: 25,06 - 25,28 - 25,42 - 31,01 - 31,45 - 31,50 - 42,11 m. kaj sur meza ondo 249 m. (resp. 11970 - 11865 - 11800 - 9675 - 9540 - 9525 - 7125 - 1205 kc/s). Adreso: *Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Varsovio, Pollando.*

**RADIO ROMA** Esperanto-Fako, Casella postale 320, Roma (Italujo).

La dissendoj okazas de h. 18.55 ĝis h. 19.10 (M.E.T.).

Ondlongoj: metroj 30.90 = Mc/s. 9.71; 41.24 = Mc/s 7.27; 50.34 = Mc/s 5.96,

Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA;

merkrede: S-ro Luigi MINNAJA; vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA.

### JULIO 1961

4: Tra la literaturo; 5: Kuriero de Esperanto; 7: Italaj karakterizaj urboj; Alba kaj ĝiaj trufoj; 11: Grandaj Sanktulinoj: S.ta Veronika Giuliani; 12: Kuriero de Esperanto; 14: Leterkesto kaj bibliografio; 18: Italaj kanzonoj en Esperanto; 19: Kuriero de Esperanto; 21: Novaĵoj el Italujo; 25: Tra Romo: Strato de la Imperiaj Forumoj; 26: Kuriero de Esperanto; 28: Porinfanaj verkistoj: Emilio Salgari.

**RADIO BERN, SVISUJO.** Lunde kaj merkrede de 13.20 - 13.30 h., jaŭde kaj sabate de 22.15 - 22.30 h. MET, per la ondoj 31.46 kaj 48.66 m. (9535 kaj 6165 kc/s). Lunde kaj jaŭde parolas d-ro Arthur Baur, merkrede kaj sabate prof. d-ro Edmund Privat.

*Aŭskultu la programojn en Esperanto kaj regule skribu al la koncernaj stacioj por danki kaj kuraĝigi al plujaj elsendoj.*

### *Jarlibro 1961*

*Listo de la konsuloj, aldonu:*

*Portugalujo: S-ro José Maria da Silva, Rua de Brito Capelo, 224, 2<sup>o</sup>-E. Porto.*

---

**Laŭkutime ESPERO KATOLIKA ne aperos en la monato aŭgusto. Kopio por la septembra numero devas esti ĉe la Redakcio antaŭ 10.8.1961.**

---

**Pro libertempo de la Libro-Servistino ni ne povas prizorgi mendojn je libroj kaj esperantaĵoj en la monato aŭgusto.**

**En tiu monato ricevitaĵoj do devos iom atendi!**